

BELGA ESPERANTO-FEDERACIO



Sonorilo

62a jaro n° 3


augusto - decembro 1970

Sonorilo

TRIMONATA BULTENO DE B.E.F.

REDAKCIO : Roose Fernand, Sint-Klaradreef 59, Brugge Tel. (050)319.81
Maertens Grégoire
Poupeye Charles

ADMINISTRADO : Balleux René, Oude Donkiaan 83, 2100 Deurne



ASOCIO SEN PROFITA CELO

SIDEJO

Sint Bernardse Steenweg 1078 Hoboken Tel. (03)276643

HONORA ĜENERALA PREZIDANTO

Jaumotte Maurice (†)

HONORA PREZIDANTO

Dro Kempeneers Paul

HONORA VICPREZIDANTO

Sielens Henri

FEDERACIA PREZIDANTO

Dro Denoël Pol, 20 rue V. Raskin Liège

PREZIDANTO

Debrouwere Gerard, Magdalenastraat 29 Kortrijk

VICPREZIDANTO

Roose Fernand

GENERALA SEKRETARIO

Verstraeten Jules, St. Bernardse Steenweg 1078 2710 Hoboken

SEKRETARIO POR LA NEDERLANDLINGVA REGIONO

Maertens Grégoire, Prins Leopoldstr. 51, 8310 St.-Kruis-Brugge
Tel. (050) 349 35

SEKRETARIO POR LA FRANCLINGVA REGIONO

Paulus Raymond, 73, rue de Montignies, Charleroi

KASISTO

Balleux René, Oude Donkiaan 83 Deurne

POSTKONTO DE B.E.F. : 1634 34 OUDE DONKLAAN 83, 2100 DEURNE

ĈEFDELEGITO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Fino Orsolini A.

rue P. Pastur 6, 6000 Charleroi P.K. 2016 40

Maurice Jaumotte



1899 - 1970

NEKROLOGO

La 30an de julio, du tagojn antaŭ la komenciĝo de la 55a universala kongreso en Vieno, kien li intencis iri, mortis la sendube plej agema kaj plej impona figuro kiun nia movado en nia lando iam ajn konis. Kvankam depost unu jaro ni ne plu estis trankvilaj rilate lian sanon, la terura novaĵo kaŭzis konsterniĝon ĉe la Belgaj esperantistoj kaj ĉe la partoprenantoj de la kongreso kiujn trafis tiu unua dumkongresa komunikado.

M. Jaumotte naskiĝis la 5-4-1899 el Valona patro kaj Flandra patrino. Tio klarigis lian perfektan dulingvecon. Li faris mezgradajn studojn en la ateneo de Antverpeno kaj en 1917 sekvis kelkajn lecionojn de Esp. donitajn de S-ro Frans Schoofs. Post militofino, S-ro Schoofs kunvokis ĉiujn siajn dummilitajn lernintojn. M. Jaumotte, tre fervora, dinamisma kaj talentoplena rilate organizadon, baldaŭ plenumis funkciojn : ĝis kiam en 1927 li iĝis la prezidanto de la grupo „La Verda Stelo”. Prezidanto li restis ĝis en 1969 seninterrompe. Unu jaron post lia prezidantiĝo tiu grupo devis organizi la universalan kongreson : Kompreneble ke M. J. iĝis la sekretario de tiu kongreso. Plie li estis kunfondinto de la „Belga Esperanto-Instituto” (librejo-eldonejo) kiu estis tre aktiva. Ankoraŭ li trovis la tempon por mem verki : la Franclingvan parton de la duvoluma „Belga Antologio” kaj „Rimvortaro”. En la lastaj jaroj kiam li estis fondinta la Internacian Aŭtomobilklubon, li redaktis ĝian revuon kaj, kune kun S-ro Boffejon, verkis fakterminaron priaŭtomobilan. Kiel tiaj ili estas ankaŭ kunlaborintoj de la ĵus aperinta „Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto”. Estas absolute ne eble listigi liajn sen nombrajn artikolojn. Verŝajne li mem neniam sciis ĝuste kiom estas. Ja tiom da fojoj oni vokis lin rapide kaj urĝe por ie aperigi respondon, kontraŭargumenton, artikolon. La sama kun liaj nenombreblaj paroladoj. En tiu rilato la naturo estis al li dotinta klaran kaj laŭtan voĉon. Kaj lia spirito estis logika, rapida kaj klara por rebati aŭ trafi. Kiu povas forgesi lian dialogon kun S-ro Alfandari kie li tutsimple forvisis sian kontraŭparolanton. En Belgujo laboris (kaj konkurencis) du ligoj Esperantaj. Nenormala estis tiu malamikeco kiu efektive ekzistis. Li ekhavis la

ideon kunigi tiujn du „nekunigeblajn ?”. Necesis multe da diplomatio, granda komprenemo por ambaŭ starpunktoj. Li sukcesis. Foje li diris al ni ke li konsideris tiun sukceson kiel la kronon sur sia laboro. El tio rezultis la „Belga-Esperanto-Federacio” de kiu - denove memkompreneble li iĝis ankaŭ la prezidanto. Unue kiel ĵurnalistoj kaj poste kiel industridirektoro li havis riĉan praktikan sperton kiun li larĝe uzis por diversaj malfacilaj atingoj favore al Esperanto. Lia laborkapablo estis ankaŭ multe pli granda ol de ordinara homo. Kiam, iom neatendite, devis okazi en 1960 la universala kongreso en Bruselo, li faris tion en minimuma tempo kaj tamen ekzemple bone. Kaj kiu inter la partoprenantoj povas forgesi lian partoprenon en la infankongreso, kie li ludis kaj dancis kun tiuj infanoj ? Senriproze li cerbumis kiamaniere progresigi la movadon. Tiu senlaca cerbumado inspiris lin al noblega ago : la fondado Jaumotte-Loquet, en kiu li versis inican kapitalon de kvindek mil ; por ke la rentumo estu utiligata por propagando. Kiam poste fondiĝis sama fondado por UEA, la „Fondado Hodler”, li iĝis ĝia prezidanto. Kaj ne estas ĉio : ĉar ankaŭ en la estraro de UEA mem li devis havi sian lokon. Se nun vi scias ke ĉio tio rilatas nur lian esperanto-agadon ; kaj ke ekster tio, li havis tre viglan aktivecon en aliaj medioj, kiel ekz. en la Ruĝa Kruco, kie li estis ne malpli ol provinca prezidanto kaj kie li gvidis la Ruĝ-Krucajn Kadetojn, tiam oni ekestas muta pro miro kaj admiro. En 1969 S-ro M. Jaumotte iĝis grave malsana. Tamen resaniĝis. En kiu grado ? Neniu povas ĝuste diri. Fakte estas ke li ne volis konscii sian malsanan staton. Vivi ne laborante, tio estis ne vivi laŭ liaj konceptoj kaj temperamento. Do li reeklaboris. Sed la sorto rebatis kaj venkis tiun giganton. Nun ni staras, kaj devas plu iri...sen li. Ni sentas nin malhelpaj, helpbezonaj, sen gvidanto. Ni klopedoj ; Ni devas klopedi ; Ni devas daŭrigi lian laboron ; Li restu vivanta en niaj spiritoj. Ni sekvu lian ekzemplon. Kaj kun tiu spirita helpo ni kapablos daŭrigi kaj ni sukcesos. Ĉar ni havis tiel grandan gvidanton ! Ni priploru lin, jes. Sed ankaŭ ni danku la vivon kiu donis lin al ni.

La Red.



FUNEBRA PAROLADO DE
HENRI SIELENS,
HONORA VICPREZIDANTO DE
"BELGA ESPERANTO-FEDERACIO"
KAJ HONORA VICPREZIDANTO DE
"LA VERDA STELO", NOME DE
LA ESPERANTISTARO

Nome de "Belga Esperanto-Federacio", de la antverpena Esperanto-Grupo "La Verda Stelo" kaj en la nomo de la esperantistoj belgaj kaj eksterlandaj, mi -kun premita koro- devas saluti por la lasta fojo nian karan, nian amatan ĝeneralan Prezidanton, Maurice Jaumotte.

Se antaŭ pli ol unu jaro ni, dum pluraj semajnoj, ĉiunmomente atendis la teruran novajon pri lia morto, li -kun la eksterordinara energio kiu estis propra al li- resaniĝis post gravaj malsano kaj operacio kaj iom post iom reprenis sian kompletan aktivecon.

Je la momento ke ni preskaŭ forgesis tiun krizan periodon kaj ke li estis preta por forveturi kun sia edzino al la Internacia Esperanto-Kongreso en Vieno, la sorto trafis lin kaj nun ni estas kruele surprizitaj.

Ni ne plu vidos nian gajan, batalantan gvidanton ; ni ne plu aŭdos lian laŭtan, spritoplenan voĉon ; nur post la unua emocio la esperantomovado plene konscios kion ĝi perdis.


En tiu ĉi dolorplena momento, mi devus skizi la esperanto-vivon de tiu, kiu ne plu estas.

Mi tutsimple ne kapablas fari tion en la limigita tempo kiun permesas al mi tiu ĉi funebra ceremonio. Mi nur povas substreki por la tioma fojo, ke nia kara formortinto dediĉis la plej grandan parton de sia vivo al nia movado ; al la movado loka kaj nacia kaj, la lastajn jarojn, ankaŭ al la movado internacia.

Esperantisto de 1917, sinjoro Maurice Jaumotte iĝis aktiva -kaj kiom aktiva !- kungvidanto de la antverpena grupo "La Verda Stelo" ekde ĝia firma restarigo post la unua mondmilito, en 1920. Neniam plu venus periodo de ripozo, de stagnado en lia aktiveco sur la esperanto-kampo.

Prezidinto de "La Verda Stelo" dum 45 jaroj, li nur antaŭ unu jaro akceptis la titolon de honora prezidanto.

Dum pluraj jaroj prezidinto de "Belga Ligo Esperantista", li -post la unuigo de la esperanto-movado en nia lando, kiu grandparte estis la frukto de liaj laboro kaj persisto- iĝis prezidanto



kaj poste ĝenerala prezidanto de la nova "Belga Esperanto-Federacio".

Prezidanto de la antverpena "Esperanto-Komitato Intergrupa", kunfondinto kaj poste prezidanto de la antaŭa "Belga Esperanto-Instituto", dum longaj jaroj direktoro de la revuo "Belga Esperantisto" kaj poste kungvidanto de la nova revuo "Sonorilo", la lastajn jarojn Komitatano kaj poste Estrarano de "Universala Esperanto-Asocio", prezidanto de la "Fondajo Hector Hodler", fondinto de la "Fondajo Jaumotte-Loquet" li ankoraŭ trovis la tempon por gvidi kursojn, por verki kaj traduki, por organizi kaj partopreni naciajn kaj internaciajn kongresojn, por tre aktive okupiĝi pri la Ruĝa Kruco de Belgujo kaj por havi sukcesan profesian kaj feliĉan privatan vivon !

Por ĉion tion fari kaj por ĝui ĉion tion, oni devas havi specialan spiriton, eksterordinarajn karakteron kaj energion, nekutimajn volon kaj povon. Li havis ĉion tion kaj nepridubeble li vivis feliĉan vivon.

Efektive li ĉiam faris kion li deziris fari ; li ĉiam atingis kion li volis atingi. Homama kaj bonfarema, li ĉiam batalis por tio, kio laŭ li estis bona kaj ĝusta, sed, ĉar li havis la respektan por la ideoj kaj la konvinko de aliaj personoj, li ankaŭ ĝuis la estimon de ĉiuj.

Tio almenaŭ estu malgranda konsolo por Sinjorino Marguerite Jaumotte, kiu tiel fidele partoprenis lian tutan esperanto-vivon : por lia filo, sinjoro Roger Jaumotte kaj por la de li tiom amataj bofilino kaj nepinoj.

Ke ili ĉiuj, same kiel la aliaj familianoj, akceptu ĉi tie la plej sincerajn kondolencojn de la diversaj esperanto-organizoj kaj de la esperantistoj individue, kiuj plene kun ili kunsentas.

Tre Kara Ĝenerala Prizidanto,

Dum nia kvardekjara kunlaborado, mi plurfoje en oficialaj okazoj esprimis al vi la admiron kaj la dankon de la esperantistoj ; la sinceran admiron pro la maniero laŭ kiu vi ĉion faris ; la elkoran dankon pro ĉio kion vi faris.

En tiu ĉi momento, mi ripetas tiun elkoran dankon.

Neniu inter ni povos transpreni viajn multnombrajn taskojn kaj funkciojn ; ni bezonos multajn fortojn por nur parte daŭrigi vian laboron kaj sekvi la de vi indikitan vojon...

Post la libertempo, kiam la gvidantoj provos solvi la organiza krizon en nia nacia movado, kiu evoluas paralele al la organiza krizo en nia lando, mankos al ili viaj saĝaj konsiloj, viaj spertaj admonoj, via klara vido, via kapablo distingi kaj decidi.

Povu la rememoro pri Vi gvidi kaj instigi ilin.

Sinjoro Jaumotte,

Kara Prezidanto,

Tre granda Amiko,

"Moŝto",

Ripozu dolĉe !

5 - 8 - 1970

AACHEN 1970

Komuna Kongreso

AACHEN. Sub la temo „Lingvaj problemoj en Eŭropo” okazis en Aachen de 27a ĝis la 31a de marto 1970 la komuna kongreso de Belga Esperanto-Federacio, Germana Esperanto-Asocio kaj Nederlanda Esperanto-Asocio. Impona kaj taŭga kongresejo estis la stata inĝenierlernejo por konstruaferoj.

Sabaton, la 28an de marto, komence de la posttagmeza solena malfermo Adam Uebags, prezidanto de la Loka Kongresa Komitato, salutis la deligitojn de la tri landaj asocioj, aron da honoraj gastoj kaj gastkongresanojn el 12 landoj. Salutvortojn nome de la tri landaj asocioj parolis Maurice Jaumotte, Belgio, Ludwig Pickel, Germanio, kaj Joaquim Calado, Nederlando.

Kiel membroj de la honora komitato salutis la kongreson d-ro B. Hille, direktoro de la inĝenierlernejo, d-ro A. Kurze, urba ĉefdirektoro en la nomo de la kongresa protektanto ĉefurbestro H. Heusch, kaj anstataŭanto de d-ro J. Effertz, registara prezidanto en Aachen.

La festparoladon faris d-ro Werner Bormann en germana lingvo pri „La lingva problemoj en la eŭropaj institucioj”.

Muzike ornamis la solenon membroj de „Collegium Musicum” de la popolaltilernejo Aachen.

La kongreso okupis sin pri la „Lingvaj problemoj en Eŭropo” dimanĉon, la 29an de marto. En la unua parto de tiu laborkunveno, sub la gvidado de Joaquim Calado, d-ro Werner Bormann resumis en Esperanto sian antaŭtagan festparoladon. En la dua parto d-ro Pol Denoël, Lieĝo, ilustris per trafikaj ekzemploj la interpopolajn

lingvajn problemojn, kiuj rekte koncernas la unuopajn homojn kaj ofte kaŭzas gravajn malavantaĝojn kaj psikajn suferojn.

Post longa kaj vigla diskutado la kunveno akceptis jenajn rezoluciojn :

Rezolucio 1

La Trilanda Esperanto-Kongreso, organizita de Belga Esperanto-Federacio, Germana Esperanto-Asocio kaj Nederlanda Esperanto-Asocio de la 27a ĝis 31a de marto 1970 en Aachen kaj kunveniginta 300 delegitojn el Belgio, F.R. Germanio kaj Nederlando kaj gastojn el Aŭstrio, Britio, Ĉeĥoslovakio, Francio, Italio, Japanio, Jugoslavio, Luksemburgo, Pollando, Rumanio, Svedio kaj Usono

- diskutis vaste la „Lingvajn problemojn en Eŭropo”, kiuj evidentiĝas, unue, en la plurlingvaj eŭropaj institucioj kiel ekzemple Eŭropa Konsilantaro kaj Eŭropaj Komunumoj, due, en la ĉiutaga interkontaktado de diversnaciaj laboristoj, kaj trie, en la ĉiam pli ampleksiĝinta internacia turismo ;
- konkludas, ke plurlingveco ne estas efike aplikebla en la Eŭropaj Komunumoj kovrontaj baldaŭ 10 ŝtatojn. limigo de la lingvouzo al unu aŭ du laborlingvoj diskriminacias la ekskluzivitajn lingvojn kaj tiel ŝajnigas malplivalorecon, necesas laŭgrade enkonduki neŭtralan lingvon, kiu estas plene kultura interkomprenilo ;

● alvokas la registarojn de la koncernaj ŝtatoj kaj ĉiujn instituciojn rilatantajn la integriĝon de eŭropaj nacioj science studi la vojojn al enkonduko de la Internacia Lingvo (Esperanto) en ĉiujn internaciajn rilatojn, kaj antaŭenpuŝi interŝtatan konvencion pri 3jara eksperimenta instruado de Esperanto en samnivelaj klasoj, kies rezultoj estos komparataj internaciskale.

Rezolucio 2

La Trilanda Esperanto-Kongreso rekomendas al la esperantistoj kaj iliaj organizaĵoj en la landoj de la Eŭropa Ekonomia Komunumo (EEK) — nunaj kaj membriĝantaj — kunlabori en la agadoj por Esperanto en la eŭropa integriĝo. La landaj asocioj starigu Eŭropo-Komisionojn, kiuj konsistu el la interesuloj pri eŭropaj aferoj. Ĉar la Eŭropo-laboroj ne estas specialaĵoj, sed parto de la normalaj laboroj de Esperanto - organizaĵoj, kunlaboru unuavice la estraroj de la landaj asocioj; tiuj asocioj ankaŭ provizore financu la agadon laŭ siaj ebloj. Ĉiuj komisionoj kune formu „Laborgrupon laŭ artikolo 217 de la EEK-traktado”. La kunordigon de ĉiuj laboroj prizorgu provizore unu el la landaj Eŭropaj Komisionoj.

La Trilanda Esperanto - Kongreso esprimas sian dankon al Itala Esperanto-Federacio pro la preparaj laboroj kaj petas la italajn esperantistojn akcepti la gvidadon de la agado en la nuna periodo kaj komenci la laborojn laŭ la memorando de la Eŭropa Komisiono de Itala Esperanto-Federacio akceptita la 7an de marto 1970 en Verona.

La Trilanda Esperanto - Kongreso atentigas pri Eŭropo-kunveno okazanta dum la Universala Kongreso en Vieno kaj petas ĉiujn interesulojn pri Esperanto en Eŭropo rezoni pri la problemoj kaj helpi, ke en Vieno estu trovita taŭga vojo por la antaŭenigo de la Internacia Lingvo en la eŭropaj institucioj.

Sub la gvidado de Uwe Joachim Moritz alia laborkunveno traktis la temon „UEA, Landaj / Fakaj Asocioj kaj Lokaj Grupoj” surbaze de 7 dis-

kutdemandoj publikigitaj en la kongresa broŝuro:

1. Ĉu UEA (Universala Esperanto-Asocio) ne taŭgas kiel tegmento super ĉiuj institucioj landaj, fakaj, ideologiaj? Kial SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) ne iĝas sekcio de UEA kaj kial la funkciuloj de IOE (Internacia Instituto por Oficialigo de Esperanto) ne aktivus en la sekcio de ISAE (Internacia Scienca Asocio Esperantista)?

2. Kial Landaj Asocioj eldonas propran (jen kaj jen eĉ luksetan) revuon en Esperanto anstataŭ seriozajn naciolingvajn informilojn (flugfoliojn, broŝurojn, dokumentojn) por la verbenda neesperantista publiko?

3. Kial UEA kaj Landaj Asocioj konkurencas varbante membrojn kaj petante donacojn? (Samo validas por TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) kaj ties Landaj Sekcioj.) Ĉu ne eblas meti ĉion en unu grandan poton kaj disdoni el ĝi laŭ la objektivaj bezonoj?

4. Ĉu konvenas aranĝi naciajn Esperanto-kongresojn? Ĉu ne preferindas plurnaciajn kunvenojn, fakaj konferencoj internaciaj, laborkunsidoj de funkciuloj, festivaletoj ktp.?

5. Kial ne ĉiu esperantisto membras samtempe en loka klubo (kaj eventuale ties faka sekcio). Landa kaj Faka Asocioj kaj UEA? Kiun sencon havas ekzemple religia asocio apud tiuj aliaj?

6. Ĉu la lokaj (eventuale regionaj) kluboj ne povas ekkoncii pri siaj eminentaj taskoj: informadi, varbadi, instruadi? Ĉu niaj klubestroj ne komprenas, ke Esperanto povos plenkreski nur, se ekzistos matura kulturo internaciilingva? Ĉu klubanoj povas kontentigi per lingva nivelo esence sub tiu de la gepratra lingvo?

7. Ĉu, eventuale, pledante por internaciismo kaj interkompreniĝo, ni estas mallarĝhorizontaj kaj inertaj?

Mi ne volas fini ĉi tiun raporton pri la kongresaj laboroj sen danki al ĉiuj belgaj, germanaj kaj nederlandaj membroj de la Loka Kongresa Komitato pro la bona organizo de la kongreso. Por la esperantistoj en la „lando sen limoj” la kongreso ne estis io nova aŭ eksterordinara. Por ili la kongreso nur estis kulmino de preskaŭ 40jara tradicio de regulaj trinaciaj renkontiĝoj. Ludwig Pickel

El Germana Esperanto-Revuo



la 55^a universala kongreso

de esperanto en vieno

(1 ĜIS 8 AŬG. '70)

Se ni denove diras ke tiu kongreso estis sukcesplena, tio ne estas ĉiama ripetado de la sama por kontentigi facile kontentigeblajn esperantistojn, sed konstato de fakto. Tiu fakto estas ke inter la multegaj nuntempaj kongresoj tiu de Esperanto okupas elstaran lokon. Ĝi okupas elstaran lokon unue pro la fakto ke ĉiujfoje ĉirkaŭ 2000 personoj el ± 40 nacioj intertraktadas kvazaŭ ili apartenus al unu popolo. Tio estas tutsimple mirindaĵo! Mirindaĵo antaŭ kiu nur la propravolaj blinduloj restas blindaj! Due, ĉar ĝi estas ĉiujfoje impona kultura manifestacio. Ĉiuj branĉoj de la arto, de la scienco, de la ekonomio kaj de la kulturo ĝenerale estas tie traktataj. Komparo kun aliaj internaciaj kongresoj, kie kutime nur unu branĉo estas lokita, kun iliaj kaprompaj lingvaj malfacilaĵoj, estas plej instrua... por tiuj kiuj ankoraŭ volas instrui sin! Tria, pro la etoso. Tie regas iu eksterordinara sento. En edukaj medioj oni konstante ripetas ke oni devas eduki junulojn al mondĉivitaneco ĉar la mondo pli kaj pli unuiĝas. Nu, tie, en niaj universalsaj kongresoj, la mondĉivitaneco efektiviĝis jam. Kia grandega aro da ĝeamikoj, kiuj komprenas kaj helpas unu la alian. Kaj kvare, ĉar ĝenerale tiuj kongresoj estas bone organizitaj. Jes estas multaj mankoj en detaloj; neeviteblaj se oni konsideras ke ĉio dependas de neprofesiaj bonvolemluloj kiuj devas dum multaj semajnoj streĉe labori por tiel granda amaso.

Detalojn pri tiu kongreso ni ne donos; vi trovos ilin precipe en "Esperanto" kaj en "Heroldo". Nur kelkajn ni volas substreki.

Kiel ĉiam la inaŭguro estis impona kaj cetere multe ĉeestita. La salutoj komencas... iom longe daŭri. Sed kie troviĝas rimedo? Malplej ni ŝatas tiujn de la tiel nomataj oficialaj reprezentantoj. Oni komprenas ke ili parolas nacilingve kaj tradukigas en E. Stultefika estis la Ĉeĥoslovaka reprezentanto kiu parolis... en alia nacia lingvo!

Tiun-ĉi fojon la inaŭguro estis despli solena pro la ĉeesto kaj parolado de ŝtatestro-esperantisto (la unua fojo ke tio okazis en Esperantujo.) Lia parolado estis rimarkinda. El tiu parolado ni ĉerpas: "Kvankam la internacia vivo fariĝas ĉiam pli intensa, la oficiala mondo daŭrigas la malnovajn kaj maltaŭgajn metodojn de lingva interkompreniĝo. Estas vero, ke la moderna tekniko helpas faciligi la taskon de profesiaj tradukistoj dum kongreso, sed ne pli. Iliaj teknikaj aparatoj estas maltaŭgaj ludiloj kompare kun la mondvasta farena tasko, nome superi la lingvajn barojn inter la popoloj, inter milionoj da homoj... Ne atendu tro multe kaj ne postulu tro multe de la oficialaj funkciuloj, sed fidu pli la propran forton! Se la Esperantomovado estas forta, la oficialaj institucioj de si mem agnoskos ĝian gravecon kaj signifon." Eĉ aliaj revuoj vi popos legi la kompletan tekston.

La lasta punkto, kiel ĉiam, estis la parolado de Prof. Lapenna. Denove ĝi estis bonega, kvankam malpli longa ol kutime. Ni havas la impreson ke la oratoro intence mallongigis ĝin (eble ĉar li konsciis pri la malfrua horo - jam duono post tagmezo); ke li povis pli disvolvi iujn tezojn el la referato. En grandaj linioj Lapenna diris la jenon: unua konstato estas ke pro la grandegaj sciencaj kaj teknikaj progresoj la homaro unuafoje en la historio fariĝis monda komunajo de popoloj. Dua konstato estas ke oni provis ŝanĝi la politikan kaj juran strukturon de la mondo - starigo de UNO - sed ke tio

en esencaj aferoj ne sukcesis..." ...la homaro ne ankoraŭ trovis sociajn, politikajn kaj eĉ kulturajn instituciojn, adekvatajn al la atingoj de la scienco kaj teknologio". La oratoro poste atentigis pri la danĝero de tiu antagonismo inter unuflanke la rapidegaj teknikaj progresoj kaj aliaflanke la postrestintaj formoj de socia-politika kunvivado : aŭ la katastrofo aŭ "...la homaro sukcesos rapidigi la procezon de sia morala-intelekta integriĝo sur pli alta ŝtupo. ...por tia supera integriĝo surbaze de egaleco kaj en maksimuma libereco, la utitigo kaj apliko de komuna neŭtrale homa lingvo estas unu el la plej gravaj faktoroj ; mi kuraĝas diri eĉ pli : ĝi estas la esenca antaŭ-kondiĉo. Efektive, sen ĝeneraliĝo de la uzo de Esperanto en internaciaj rilatoj de la popoloj tia integriĝo ne estas imagebla" Parafrazante citajon de Oppenheimer (sed ne dirinte ties nomon) L. emfazas ke "90 % de ĉiuj sciencistoj, kiuj iam ekzistis, vivas en la nuntempo". Per tio li volis argumenti ke ankaŭ Esp. bezonas modernajn sciencajn labormetodojn. Je la fino L. memorigas - kaj ĝi estas argumento kiun ni en niaj konversacioj klare devas disvolvi - ke ankoraŭ nun ĉiuj internaciaj aranĝoj fariĝas surbaze de avantaĝoj por iuj kaj malavantaĝoj por aliaj. Nur ni en nia esperanto-mondo estas komplete neŭtralaj kaj egalrajtaj... ĝis en la lingvo. Per tiu parolado L. denove pruvis ke li ankoraŭ ĉiam havas mesaĝon por ni.

Intence ni ne pritraktas tie-ĉi la aliajn erojn de la kongreso ĉar ili malpli tuŝas la ideologion de nia movado kaj malpli la signifon en la ĝenerala kadro de kongresoj. Sufiĉas mencii ke okazis denove Somera Universitato, oratorakaj belarta konkursoj, teatraĵoj kaj la multaj, multaj kunvenoj de diversaj fakorganizoj. Kaj ne forgesi la admirindan akcepton en la urbdomo kie bonegaj trinkaĵoj kaj manĝaĵoj abundis . Sed pri ĉio ĉi-tio legu (interesajn) raportojn aliloke.

RABATO POR ESPERANTISTOJ

LA ĈARTO DE U.N. NUN EN ESPERANTO

Aperis unuafoje en Esperanto la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj. Al la Ĉarto estas aldonita ankaŭ la Statuto de la Internacia Kortumo (en Hago), kiu estas la ĉefa juĝa organo de U.N. La du dokumentoj aperis kune en unu broŝuro 96-paĝa, en la sama formato miniatura kiel la nacilingvaj eldonoj de la Ĉarto. Eldonis ilin Universala Esperanto-Asocio, kaj ili aperas kiel la numero 1 en nova eldonserio "Dokumentoj de Internacia Kunlaboro", sub aŭspicio de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj. La dokumentojn tradukis Ralph Harry, ambasadoro de Aŭstralio en Sajgono, prof. Ivo Lapenna, profesoro pri juro en Londono, kaj Eskil Svane, ĝis antaŭ nelonge membro de la dana delegacio ĉe la Konsilo de Sekureco. Ilia traduklaboro senduble havos normigan influon por la terminaro de Esperanto sur la kampo de internacia juro. Prezo : 2,70 Ned. Guld.

Kaj La Venko De Esperanto

En la unua numero de la jarkolekto 1970 de "Sonorilo" ni disvolvis opinion ke la venko de Esperanto estas afero de longa daŭro. Ni pro tio ne malpacientiĝu : Ĉiuj vere gravaj revolucioj en la historio, tiuj kiuj vere profunde ŝanĝas la homon kaj ĝian vivon, okazis tre malrapide... sed despli efike, despli profunde. Nun ankoraŭ ni konstatas ke ekzistas altegaj muroj de kontraŭstaro kaj de antaŭjuĝo kiuj malhelpas nin. Ŝajnas al ni ke ni vidis konfirmon de tiu nia ideo en la parolado de la Aŭstria ŝtatprezidanto dum la inaŭguro de la universala kongreso. Tamen nia artikolo vekis reakciojn, kiujn ni parte publikigis. Nun envenis alia reakcio de Hungara samidano kiun ni ankaŭ volonte publikigas.

Kelkaj vortoj pri la estonto de nia movado

Konstanta zorgo kaj solvenda problemoj estas por nia movado inter aliaj la futuro. Ni povas diri, ke sen junularo ĝi ne havos estonton kaj tio donas por ni la taskon okupiĝi pri la evoluo de la movado ; pri tio, ke la nuna stabo de la esperantistaro havu posteulojn, por kiuj ili povu transdoni la stafetbastonon, por pluenkonstrui la organizon de unu el la plej noblaj ideoj.

Estas bedaŭrinde, ke la junularo ne montras tiel grandan interesiĝon al tiu ĉi ideo, kiel ĝi meritis, kvankam la esperantistaj centroj kaj societoj faras konstante propagandon, ĉiam pruvante la utilecon de nia lingvo.

Sed ankaŭ estas sendube, ke la kultura vivo enhavas multajn aliajn temojn interesajn, kiuj povas okupi la interesiĝon de la homoj. samtiel tiun de la junularo, kaj abunde ili povas elekti el tiuj la plej plaĉan, plej konvenan tiel por profesia, samkiel por amuzigaj celoj. Do, se ni deziras, ke pli efike ni povu vekti la atenton de la homoj pri ni, ni devas konstante serĉi la eblecojn tiucele.

Miaj pensoj concernas pleje la junularon.

Niaj tagoj ege montras la sopiron de la homoj por vojaĝi eksterlande, ekkoni la mondon, homojn k. t. p. kaj tiu ĉi sopiro eĉ evoluas. Por atingi tiun ĉi celon antaŭ multaj homoj staras kiel proksima celo la aŭtomobilo. La vojaĝantoj grandparte estas junuloj. **Facile ni povas pruvi, ke tiu, kiu havas aŭtomobilon, intencas vojaĝi eksterlanden, nepre bezonas la internacian lingvon !** Laŭ mia opinio povus esti

efika afiŝo, sur kiu estus desegnita aŭto, apud ĝi la teksto : „Se Vi vojaĝos eksterlanden , ne montradu kiel surdmutulo, sed ellernu la internacian lingvon : Esperanton !” - nature nacilingve.

Ni jam multe parolis pri tio, ke per nia lingvo facile ni povas krei internaciajn konatiĝojn, amikecojn : la amikeco povos montriĝi en multaj okazaĵoj de la vivo kaj tiel ankaŭ en la plej grava mondmovado : por la paco.

La plej granda valoro estas por la homoj - krom la sano - la paco, - kaj ne estas pli granda kulpo kontraŭ la homaro, ol la milito ! Kaj en la milito plej multan perdas la junularo, kiun la registaroj devigas soldat-servi, batali kontraŭ nekonataj, same senkulpaj homoj, kaj eble frue morti.

Do ĉiomaniere la plej grava tereno de nia laboro estas la vivo de la junularo ! Ni devas trovi aŭ eltrovi eblecojn por ke ni povu adeptigi el ili la plej grandan nombron.

Krom la ĉiujare organizitaj kongresoj ni aranĝu junularajn esperantistajn kunvenojn, tendarojn, ĉiujare en alia lando. Komenco jam ekzistas : en Hungario ĉe la lago Balaton ĉiujare oni aranĝas esperantistan junularan tendaron / kun eksterlandaj partoprenantoj el kelkaj landoj/, sed ĝis nun ĝi ne havis grandnombran partoprenintaron ; ĝin evoluigi estus la tasko grandskale.

Estas kompreneble, ke la landaj asocioj devas fari kontakton kun ĉiuj junularaj organizaĵoj, konvinki ilian gvidantaron pri la utilo de niaj celoj, aranĝi kursojn, akiri internaciajn amikajn kaj societajn kontaktojn, por ke poste ni havu sukceson por la mondjunularaj esperantistaj tendaroj.

En la kadroj de la societoj ni malfermu eblecojn por la junularo al diversaj agadoj naskiĝintaj el ilia penso kaj ni ne devigu ilin nur por sekvi niajn malnovajn kutimojn en la societa vivo.

Elkresku novaj branĉoj el la maljuna, nun jam okdektrijara trunko !

Ne estu ĉiam seriozeco, sed estu laŭtaj la societaj ejoj pro la rido de la junaj esperantistoj !

Laŭ mia opinio ĉi tiu estas nun nia plej grava tasko, ĉar nur tiam Esperanto havas estonton, se ni havas nun kunlaborantan junularon !

Sándor Szalay
/Hungario/

FONDAĴO M. Jaumotte-Loquet

FONDAĴO por la Disvastigo de la Informado pri ESPERANTO

TRANSPRENO	129.005 F
S-ro Cuypers R. (Mechelen)	2.500 F
Koran Dankon !	131.505 F

(Pagoj akceptataj pere de la pĉk 291429 de Maertens Gr. Sint-Kruis)

BIBLIOGRAFO

Johan Hammond Rosbach : "Disko" = ciklo da skizoj. 112 paĝoj. Prezo : 12 Dan. Kronoj. Eldonis Dansk Esperanto- Forlag sub direkto de L. Friis en Aabyhoj (Ingemannsvej 9) Danlando.

En la lasta tempo samideano Friis kuraĝis eldoni nombron da verkoj, inter kiuj elstaras la du de J. H. Rosbach. Ni jam povis tre laŭde recenzi la "Mirinda Eliksiro" (vidu "Sonorilo"n de marto aprilo 1968) kaj ni ĝojas ke same laŭde ni povas nun skribi pri "Disko"

Ni komencu tamen per la kelkaj etaj makuloj. Estas preseraroj sur paĝo 9, linio 14 "febluo" ; p. 23, l. 12 "la" ; p. 44, l. 2 "le" kaj p. 94, l. 13 "mortigis". Krome estas du pres-aŭ gramatikaj eraroj p. 67, l. 14 "sia" kaj p. 105, l. 1 "iliaj inspiro" Fine, ĉu la verkinto intence skribis "sia" en la frazo : (p. 68, lasta linio) Pauline, kiuj estis la brila lumo, la granda espero de sia familio, la fiero de siaj gepatroj kaj geonkloj...?

La eldonisto, sur la lasta kovrilpaĝo parolas pri noveloj ; sed estas vere skizoj. La aŭtoro volis kunligi la rakontojn en unu kadro, tiu de ŝipo, kaj de la ĉefaj personoj de tiu ŝipo. Tio estas iom artefarita ĉar, ekzemple, la rakonto "La Infanveturilo" tute ne estas rivela rilate al tio. Plie, ni tre miras ĉar la aŭtoro metis tiun rakonton sub ĉapitro "Amuzisto" (!). Legu ĝin kaj vi same mir(eg)os kiel ni. Ankoraŭ io. Prave la eldonisto skribis ke estas iu moralo en la serio de rakontoj. Tamen tio ne estas la kazo por la citita "Infanveturilo". En ĝi ni perceptas nenium moralon aŭ filozofion. Bona eco estas ke la rakontoj estas tre variaj laŭ tono kaj tendenco. "La vitra okulo" estas iugrade terurelvoka (=makabra) ; "La apuda numero" estas rikanema kaj "Memestimo" estas iom drameca. J. H. Rosbach skribas bonege ; Li kapablas kapti la atenton. Ni tute rekomendas la libron.

"Norda Prismo"

N-ro 1 de 1970 havas 64 densajn paĝojn, multe ilustritajn kaj kun plej varia enhavo. Poeziamantoj, geografoj, sciencistoj k.a. trovas en ĝi laŭ sia gusto. N-ro 2 havas eĉ 84 paĝojn sed estas speciala numero pri la ekonomio de Danlando. Espereble ĝi altiros denove la Danlandajn aŭtoritatojn pri Esperanto, kiel tio jam okazis kiam N.P. eldonis specialan Gronlandan numeron. Adreso : Brondsbyster Torv 6 ; 2650 Hvidovre Kopenhago ; Danlando.

Soveta Uzbekistano N-ro 1.

Oni scias ke en la ĉefurbo de la malproksima Uzbekistano laboras fervora grupo da esperantistoj. Ree ili publikigis 30-paĝan broŝuron pri ekonomio kaj kulturo de tiu respubliko. Prezo ne estas indikita. Eble la broŝuro estas senpaga ĉar la redakcio promesas pritrakton de demandoj kaj sugestoj. Adreso : Esp.-Komisiono ĉe la Uzbeka Amikeca Asocio ; str. Ahunbabajeva 1 ; Taskent ; Uzbekistan ; USSR.

Piena Ilustrita Vortaro.

Aperis tiu giganta verko de 1344 paĝoj, eldonita de SAT, Avenue Gambetta 57 Paris 20. Prezo : 26.10 Us Dol. sendkestoj inkl.

Ni esperas ke en venonta numero ni povos publikigi recenzon.

Aperis ankaŭ la verkoj de Heinrich Heine en traduko de K. Kalocsay kaj G. Waringhien, kaj eldonita de "Stafeto" sub direkto de Prof. D-ro J. Regulo Perez. La Budapeŝta presejo CORVINA presis ankaŭ la "Elektitaj Poemoj de Sandor Petöfi" en traduko de D-ro K.Kalocsay. Pri tiuj du lastaj libroj ni ne ankoraŭ scipovas konigi detalojn.

FIRMA VAN ISEGHEM & VERSTRAETEN

P. V. B. A.

St.-Bernardse steenweg 631
Hoboken

Vitraloj - Speguloj - „securit“ vitro	Vitro-cementoj por
kolorigitaj vitroj	tutvitra-konstruaĵoj
aluminiaj senmastikaj stangoj por kupoloj	mastiko
	Telefono 272875

ESPERANTO-JUNULARO

La Esperante-junulargrupo de Brugge (Sint-Kruis) elektis la 23.8.1970 novan estraron:

Prezidanto	:	Paul Blondelle, L. Debruynestraat 67 Sint-Kruis
Vicprezidanto	:	Jan Rachels
Sekretariino	:	Hilda Lauwers, Rodenbachstraat 25 Assebroek
2-a sekretariino	:	Leen Blondelle
Kasistino	:	Hilde Roose

La estraro petis al Johan Maertens por prizorgi la gazetaran servon. Delegitaro ĉeestis la internacian junularkunvenon en Domburg (Walcheren, Nederlando).

La estraro decidis kunlabori pli intime kun la patrona grupo "Paco kaj Justeco", (la antŭa estraro sub influo de Dirk Iserentant jam komencis pli frue kun tiuj traktadoj).

Ankaŭ la internacia movado komencas interesigi parton de la membroj, kaj ili decidis aboni "Kontakto" la revuo de TEJO.

La unua kunveno kun la patrona grupo okazis la 4.9.70 en 't Schuttershof je la 10-a horo. Tian kunvenon ni aranĝos regule la unuan dimanĉon de la monato, sama horo, sama ejo. Ni do petas al ĉiuj plenkreskuloj por ke ili ĉeestu tiujn kunvenojn por sukcesigi la kontakton kaj revivligi la Bruĝajn grupojn.

ANTVERPENO

Esperanto-grupo "La Verda stelo"
Kunsidoj : Ĉiuvendrede en Brasserie
"Capitole", Gemeentestraat 15
2000 Antwerpen, je la 20,15a horo.
Poŝtĉekkonto : 726.54 (Deurne)

La 3an de junio S-ro R. Van Eynde prezentis dokumentajn filmojn pri la aŭtofirmo FIAT kaj en kiuj tiu firmo montras la naskiĝon de novaj aŭtomodeloj.

La 10an la verdstelanoj kunvenis sur la Granda Placo de kie ili - gvidataj de S-ro E. Paesmans - ekpromenadis tra malnova kvartalo de Antverpeno kie oni admiris diversajn pitoreskajn kaj historiajn aŭ folklorajn vidindaĵojn. Estas la sekreto de S-ro E. Paesmans : ĉiufoje dum sia ĉiujara rondgvidado li havas ion specialan por montri aŭ viziti !

La 17an S-ro Petro De Smedt paroladis pri "La Flandra Literaturo en la Esperanto-gazetaro. Dum kelkaj jaroj jam li estas verkanta bibliografion pri ĉiuj flandraj verkoj kiuj jam estas tradukitaj. Estas pri tiu laboro ke li raportas, pri la malkovroj kiujn li faris kaj pri la anekdotoj kiujn li spertis.

La 24an distra programo agrable variis pro la kvizo de S-ro C. Borremans. Estis 3 grupoj kiuj "batalis" por kapti "sensangan" venkon. Diversaj ekstergrupanoj ĉeestis kaj ili gajnis la ĉefpremion. Tamen la senlaca S-ro C. Borremans kunportis premiojn por ĉiu.

La 1an de julio la programo staris en la signo de la libertempo. S-ro Jo Haazen vizitis Nederlando kaj kontaktis kun la "koboldoj" (kabouters) en Amsterdamo. Li detale kaj sprite donis siajn impresojn : li ne povas ĉiam akordiĝi pri ilia konduto aŭ vivmaniero. Ankaŭ pri siaj kontaktoj kun aliaj nederlandaj familioj, i.a. kun la familio Koopmans-Schotanus, li raportis.

La 8an dum kultura distra vespero S-ro R. Van Eynde detale rakontis pri sia dusemajna restado en la regiono de Lieĝo. La diversajn legendojn kiuj rilatas al la promenadoj li konigis.

La 15an, antaŭvide al la 55a Universala Esperanto-Kongreso en Vieno. S-ro Jo Haazen pritraktis "La Histo-

GRUPA VIVADO

rio(n) de la Esperanto - Kongresoj", sed precipe parolis pri la U.K. kiuj okazis en Belgujo. Ankaŭ pri la 1a kongreso en Boulogne-sur-Mer li multon klarigis citante diversajn partojn el la fama parolado de D-ro L. Zamenhof.

La 22an staris en la signo de la "popola humoro".

La komitato decidis estontece - kiel antaŭ unu jaro - denove regule kunveni ĉiusemajne dum la VENDREDO !

Vendredon, la 31an S-ro J. Verstraeten anoncis la teruran novajon pri la subita morto de la Honora Prezidanto. S-ro Maurice Jaumotte. Antaŭ la staranta ĉeestantaro li skizis grandlinie la vivon de la mortinto kun liaj multnombraj meritoj kaj kvalitoj. Post unu minuto da silento S-ro J. Verstraeten fermis la kunsidon en la signo de la profundo funebro.

Merkredon, la 5an de aŭgusto okazis la Solena Enterigo de S-ro M. Jaumotte, de kiu vi povas legi detalan raporton aliloke e n "Sonorilo".

Vendredon, la 7an S-ro J. Verstraeten longe raportis pri la enterigo de S-ro M. Jaumotte en la antverpena tombejo "Schoonselhof". Poste S-ro R. Balleux (anstataŭante S-ron E. Paesmans, malhelpita) prezentis diapozitivojn pri la Universala Ekspozicio en Osaka/Japanujo kun abunda komentario.

La 14an ne okazis kunsido pro Antverpeno Kermeso.

BRUGA GRUPO ESPERANTISTA - REGA SOCIETO

Kunvenoj : marde je la 20a horo, en "Strijdershuis" Hallestraat 14, (apud Markt)

Adreso de la prezidanto : Ch. Poupeye
Filips de Goedelaan 17b

Telefono (050) 183 58

Notindaj estas jenaj okazintaĵoj :

3/20 : Ĉe la vicprezidantino S-ino Verbeke-Vandenbergh, diapozitivoj kaj filmo pri neĝterio en la Nigra Arbaro.

- 17/3 : Komuna vespermanĝo en kampara restoracio en Oostkerke.
 24/3 : En Strijdershuis belega filmo pri Korsiko prezentita de Ges-roj. De Wasch. Ĉeestis pluraj ne-esperantistoj.
 7/4 : Raportado pri la Trilanda kongreso en Aachen, 28/29/30 de marto, ĉeestita de delegitoj de la grupo.
 24/4 : (invitita de "Paco kaj Justeco") Parolado kun diapozitivaj pri Japanujo kaj prezentado de simpla japana kalkulilo, ambaŭ fare de F-ino. Oshawa. Gazetistoj ĉeestis kaj favore raportis en lokaj gazetoj.
 12/5 : F-ino Y. Poupeye raportis pri la Markola Kongreso de Folkestone (1-2-3 de majo)
 9/6 : Dum vera somera vespero, ĝardeno kunveno ĉe F-inoj. Van Parys.
 23/6 : Strijdershuis : Lasta kunveno antaŭ la ferioj.
 5/8 : Grupa delegacio ĉe la entrego de S-ro. Maurice Jaumotte.
 11/8 : Strijdershuis : Vizito de F-ino Yvonne Bouxom el Lille (Fr). Rememorigo Maurice Jaumotte kaj poste raportado de F-ino. M. Willems, pri la 55a Universala Kongreso Wien 1-8/8.

LES ENTREPRISES

DERKS

226, Rogierstrato, BRUSELO 3

Tel. : 16.89.92 Entrepreno de
KONSTRUAĴOJ

REGA ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO
 Tel. 02/15 26 01 PĈK 12 30 48
 Sidejo : Hotelo "EXCELSIOR", strato de la Progreso 7 1000 BRUSELO

Post-libertempa grupa programo :
 je la 20a horo :

SEPTEMBRO 1970

- 07an : Informoj pri la morto de nia federacia Prezidanto. Sinjoro Maurice Jaumotte, okazinta la 30an de julio 1970.
 Raportoj pri la 55a Universala Kongreso en Vieno (I-8 : VIII : 70)
 14an : Parolata jurnalo (serioj A kaj B).
 21an : Perfekta Kurso, fare de S-ro van der Stempel.
 28an : S-ro CASTEL komentarioj aliajn "Leteroj(n) el mia muelilo, de Alphonse Daudet.

OKTOBRO 1970

- 05an : Parolata jurnalo (serioj A kaj B).
 12an : S-ino ERNST recenzos pri "La mondo ne havas atendejon".
 19an : Perfekta Kurso, fare de S-ro van der STEMPEL.
 26an : S-ro JACOBS prezentos **filmon** : "Krozado al Dakaro", kun komentarioj kaj folkloro muziko.

NOVEMBRO 1970

- 02an : Parolata jurnalo (serioj A kaj B).
 08an : **Dimanĉe : JARA FESTENO de BRUSELA GRUPO**, honore al S-ro JACOBS.
 09an : S-ro FERNANDEZ (el Gento) parolados pri la "Anatomio de humoro".
 16an : S-ro DEKROM montros novan serion de **diapozitivaj** : "De Barcelono al Torremolinos".
 23an : Perfekta Kurso, fare de S-ro van der STEMPEL.
 30an : S-ro VAN HUMBEECK organizos gviditan "Debatvesperon", laŭ nova kaj persona maniero.

DECEMBRO 1970

- 07an : Disdono de la premioj de la parolata jurnalo 1970, kaj... lanĉado de la Parolata jurnalo 1971 !
 14an : Lasta kunsido de la jaro ! Dank'al nia verkisto S-ro Albert SAMYN, ni digne partoprenos al la **ZAMENHOFA VESPERO**.

Ĉiuj samideanoj estas elkore atenditaj al niaj inter-amikaj vesperoj.

Por ĉiuj viaj asekuroj - reasekuroj

unu adreso :

J. VERDYCK & Co Pvb.

ANTWERPEN, 8, Vleminckveld

Telef. 03/320902 - Telekso 32283 - Telegr. "Dyckassur"

Oficejoj en London - Rotterdam - Lieĝo.

Reprezentanto ĉe "Lloyd's - London"

Unuaklasa Servo

Faklerta laboro.

Korespondas en Esperanto.

PROPAGANDCELE kaj por malpligrandigi stokon

„Sonorilo" vendas je favorprezoj ĉi-sube menci-itajn librojn :

- taŭga lernolibro por E^o (F. Randi) 10,—
- Virina Koro (teatraĵeto de V. Sabbe) 5,—
- Elektitaj Noveloj (Lode Baekelmans) 15,—
- Elektitaj paroladoj (de Ivo Lapenna) 100,—
- Aventuroj de Stultulof (tre facila legolibreto) 5,—
- Bela subtera mondo (eldono de „Stafeto" ilustrita) 75,—
- El la mitologio de antikvaj popoloj 6,—
- Esperanto-examenopgaven 12,—
- Esperanto in een notedop (zakwoordenboekje + gramatika) 6,—
- la Fino (de grafo Folke Bernadotte) 20,—
- Fundamento de Esperanto (eldono franca) 10,—
- Konscienco riproĉas 10,—
- Menuaro pri geografiaj nomoj 5,—
- Mocja Etulino (infanlibreto riĉilustrita en koloroj) 8,—
- Pregareto (de Garolfi) 8,—
- Provinca gastejo (teatraĵeto) 8,—
- Taglibro de vilaĝpedelo 4,—

RIMARKO : al tiuj prezoj aldoniĝos la sendkostoj

SONORILO — KERKLAAN 61 BRUĜO

NEKROLOGO

Forpasis Fraŭlino Palmyre De Cock, membrino de Flandra Ligo ek de la starigo, reprezentantino por Aalst dum longa periodo, poste fidela membro kaj administrantino de BEF, delegitino por Aalst de Universala Esperanto-asocio ekde la jaro 1949.
 Elkorajn kondolencojn